Carl Riedel,

## Venu, paŝtistoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Venu, paŝtistoj,
Vi homoj al ni!
Venu kaj vidu
La filon de Di'!
Kristo hodiaŭ
Por vi naskiĝis,
Via Savanto
Li elektiĝis.
|: Ne timu vi! :|

Venu rigardi
Vi tion kun ni,
Kion promesis
Ĉiel-melodi'!
Kion vi trovos.
Ni diskonigu,
Kaj la Sinjoron
Ni honorigu!
|: Haleluja! :|

Estas ĝojego
Por la paŝtistar',
La sciigaĵo
De la anĝelar':
Inter la homoj
Nun iĝu paco
Kaj sur la tero
La Dia graco.
|: Al Di' honor! :|

. . .

Carl Riedel,

## Aŭdu, paŝtistoj

*tradukita de Albrecht Kronenberger*

Aŭdu, paŝtisto,
mi diras al vi
Bonan sciigon
pri l' Filo de Di':
Enkarniĝinta,
ĵus naskiĝinta,
Ĉirkaŭvindita,
entrogigita.
Gloron al Li!

Vidu, homidoj,
la amon de Di'.
Malsupreniris
la Vorto por vi.
Kruce murdota,
entombigota,
Resurektonta,
ĉiel-ironta.
Gloron al Li!

Venu, kristanoj,
rapidu al Li,
Kiu bebiĝis
en stalo por vi.
Miru ĝojante,
kore kantante,
Genufleksante,
Lin adorante.
Gloron al Li!

. . .

Carl Riedel,

## Nesem vám noviny

*tradukita de N. N. 44*

Nesem vám noviny,
poslouchejte,
z betlémské krajiny,
pozor dejte.
slyšte je pilně
a neomylně,
rozjímejte.

Syna porodila
čistá Panna,
v jesličky vložila
Krista Pána.
Jej obvinula
a zavinula,
plenčičkama.

K němuž to andělé
z nebe přisli,
i také pastýři
jsou se sešli.
Jeho vítali,
jeho chválili,
dary nesli.

Andělé v oblacích
prozpěvují,
narození Páně
ohlašují,
že jest narozen,
v jeslích položen,
oznamují.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de* Carl Riedel *(∗1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1982.*

*MR-014-3 / Arg-565-1140 (2010-09-20 10:01:32)*

*La muziknotojn vidu jen:* `http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038`.

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de* Carl Riedel *(∗1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de* Albrecht Kronenberger *(∗1940-01-21) en 1990.*

*Arg-565-1142 (2010-09-20 11:11:28)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la retejo* `http://reocities.com/cigneto/thctxt/a/auxdupasx1.html`.

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de* Carl Riedel *(∗1827-10.05 – †1888-06-03) en ĉeĥa de N. N. 44.*

*Arg-565-1460 (2012-12-26 12:32:12)*

*Vidu ankaŭ:* `http://archiv.radio.cz/christmas/koleda/k1.html`.